



La Suda Kraco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio:

Box 1367, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio)

Abono (por dek du numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj,
aŭ 24 respondkuponoj.

Unu numero: 4 pencoj aŭ 2 respondkuponoj.
Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo aŭ 5 respondkuponoj.

N-ro 24.

Melburno (*Melbourne*), Australio.

10 Junio, 1922.

Brazilian Government Encourages Esperanto.

The Government of Brazil is, perhaps, more sympathetic than any other towards Esperanto. Its parliament recently by resolution placed on record the fact that it considers the Brazilian Esperanto League to be a society whose activities are for the public good. Soon afterwards the President of the Republic received a deputation from the League and promised his assistance, particularly in arranging for the instruction of Esperanto in the public schools. The President intends to learn Esperanto as soon as his public duties will permit of it.

With a view, possibly, to rendering assistance during the forthcoming national exhibition, (Sep. to Nov., 1922), the International League of Esperantist Postal Officials asked the Minister of Public Works to supply the names of Esperantist postal officials. The Minister was good enough to accede to the request, and directed the heads of the post and telegraph services to send to the President of the Brazilian Esperanto League the names and addresses of all officers who already know Esperanto, who are now learning it or are in sympathy with it. A circular from

the departmental chiefs acquainted all postal and telegraphic officers with this decision.

Here and There.

Bulgaria.—The Plevna public library has received a bequest of a great number of Esperanto books collected by the late s-ro S. P. Simou.

At Alexandrovo a class is attended by teachers of the local schools.

The groups at Bjala, 40 members, and Karlovo, 42 members, meet regularly.

At Plovdiv a lecture was given at the Theological college. Permission to commence a course is hoped for.

The Rio de Janeiro Commercial League has adopted the following resolution: "This League being convinced that Esperanto has practically solved the problem of an international auxiliary language, as proved by its many useful activities, and especially as regards commerce, strongly recommends the teaching of Esperanto in all commercial schools and institutions.

A blue cross on the wrapper of the Suda Kraco indicates that your subscription is due, and should be renewed at once.

La Unua Aeropoŝta Servo en Australio.

La unua aeropoŝta servo en Aŭstralio, estas tiu, kiun la Registaro lastatempe iniciatis en Okcidenta Aŭstralio, inter Geraldton kaj Derby. Nemulte da personoj loĝas ekster la urboj en ĉi tiu regiono. Ĉar vojoj preskaŭ malestas kaj ŝipoj devas atendi la en- kaj elŝipigon de komercaĵoj la ĝisnuna servo, ĉu per landa, ĉu per mara kuriero, estis malrapida kaj neofta. Nun la aeroplano foriras el Geraldton ĉiun vendredon kaj sekvas la konturon de la marbordo. Ĝi vizitas Carnarvon, Onslow, Roebourne, Port Hedland, Broome kaj, fine, Derby, kiun oni atingas dimanĉe, post flugo de 1100 mejloj. La reira flugo estas farata dum dimanĉo ĝis mardo. La tarifo estas po tri penceoj por ĉiu duonunco, adiciita al la ordinara pago de du penceoj por duonunco. La servo portas nur unuagradaj poŝtaĵoj, kiuj devas esti surskribitaj "Por aera poŝtado." Ĉar flugpoŝtaj markoj ne estas eldonitaj oni uzas la ordinariajn poŝtmarkojn.

Kortus'anta Alpeto.

Lia Moŝto la Estro de la Armena Eklezio elsendis cirkuleran leteron al ĉiuj anoj de la Armena Eklezio, kiuj estas ekster la hejmlando, denove petante helpon por sia popolo. Neniu povas sufiĉe priskribi la suferadojn de la armena nacio; sed ĉi tiu letero iom realigos al legantoj la terurojn de la longa dolorvojo, sur kiu marŝis la nacio kaj eklezio. La persekutado kiun ili suferis en la lastaj jaroj plene egalas tiujn de antikvaj tempoj: ili estis amase fimortigitaj, deportitaj en la dezertojn aŭ malliberigitaj en turkaj haremoj, kie ili eĉ ankoraŭ restas: oni kalkulas, ke almenaŭ 1.5 milionoj pereis dum la Granda Milito, kaj pli ol duono da miliono estis forportitaj. La preĝejoj silentiĝis; la hejmoj estas detruitaj; la naciaoj, kiuj supervivis la multajn buĉadojn, estas disigitaj en ekzilejojn; vidvinoj kaj miloj da orfanoj kompatindegaj bezonas helpon de tiuj "kristanaj kaj humanaj ŝtatoj," kiuj "restis silentaj kaj nezorgemaj antaŭ tiaj teruregoj" (Ni citas la vortojn de la Alpetanto). Ni subskribas la kortuŝantan Alpeton, petante ke samideanoj el ĉiu lando donu tian helpon, kia eble.

Kroniko.

Perth, Okcidenta Aŭstralio.—La grupo, "Nigra Cigno," progresas malrapide, sed certe. Dum la pasinta kvar monatoj ĝi faris reklamacojn en la tagjurnaloj kun kontentigaj rezultatoj. La edukada aŭtoritato rigardas nian aferon favore. Oni permesas la senpagan uzon de ĉambroj en "The James Street Boys' School." Ĉiun mardon en tiu lernejo diploma klaso gvidata de f-ino Cherrett, mezlernanta klaso gvidata de s-ro A. Saar kaj klaso por komencantoj gvidata de s-ro C. Cairns regule kunvenadas. Entute ĉeestis 30 anoj. Plue, la edukada aŭtoritato forigis nenecesan temon el unu knaba klaso, kaj permesis la instruadon de Esperanto dum unu horo en ĉiu semajno, kiam s-ro H. M. Leighton instruas 26 diligentajn knabojn. La ĉef — bibliotekisto de la Perth Publika Biblioteko post inter konsiligo kun oficistoj de la klubo elektis kelkajn Esperantajn librojn, kiujn li metos sur la bretojn de la biblioteko.

Parolada kunveno okazas ĉiun ĵaŭdon ĉe la domo de gesinjoroj Goody, al kiuj la grupo esprimas gnan plej koran dankon.

South Belgrave, V.—D-ro F. J. Williams parolis la 20an de majo, ĉe kunveno de la loka grupo. Malavara kolekto por helpi la U.E.A. estas ricevita. La vigla sekretariino de la grupo estas f-ino Giles, "Warrawing," South Belgrave.

Woomelang, V.—Nova grupo, ĉe la Knabina Klubo. F-ino Dettman estas sekretariino kaj instruanto de la naŭ lernantoj.

Rabaŭl, Nov-Gineo.—Oni skribis: — Niaj du grupetoj iras bone. De el la Eŭropanoj estas propagandemaj kaj unu el ili antaŭ du semajnoj alkondukis kvar novajn lernantojn. Kompreneble, ni ankaŭ perdas membrojn, sed... maski! La Ĉinoj estas sufiĉe diligentaj; ni jam havas Germanajn lernolibrojn kaj vortarojn. kaj progreso estas pli rapida. La juna Ĉino-Melaneziano estas tre bona. Li kaj alia junulo, Ĉino, estas tre amataj inter nia Melburna rondo, mi kredas.

Melburno, V.—Ekzameno por la B.E.A. prepara atesto okazis lastan monaton. Ekzameno por la diplomo de B.E.A. havos lokon en Melburno

dum julio. La grupo energie studadas por partopreni.

Bonkora Melburna samideano donos premion de unujara abono de membro-abonanto al U.E.A. por tiu plena membro de la A.E.A. kiu Esperante verkos la plej bonan trak-taton pri Esperanto. La longo devas esti 200 vortoj kaj devas atingi la juĝanton, (kiu ankoraŭ ne estas nomita), antaŭ la unuan de aŭgusto. Por pluaj informoj turnu al la Sekre-tario de la A.E.A.

Koncerto, Queen's Hall, la unuan de Julio.

La koncerto por gajni monrimedojn por U.E.A. okazos la unuan de julio, ĉe la Queen's Hall, Strato Collins, Melburno. Enirbiletoj nun estas pretaj kaj Melburnaj samideanoj povas ricevi provizon de la Delegito aŭ Vic-delegito en ĉiu grupkunveno. Samideanoj en la kamparo kaj en aliaj ŝtatoj povas partopreni en la afero kvankam ili ne povas ĉeesti la koncerton se ili bonvole aĉetus bileton. La prezo estas 2ŝ 2d. — Bono farita ne estas perdita.

Aviso Al Niaj Abonantoj.

Lastatempe, pro la alta poŝtarifoj, ni ne sendis kvitancon por abonoj al la "Suda Krucio," sed notis la ricevon de mono sub rubriko, "Al Niaj Sub-tenantoj." Eble la plimulto de la abonantoj ne bone memoras ĝis kiam iliaj abonoj estas pagitaj, aŭ eĉ ne scias. Estas fakto, ke la ĵurnalo estas sendata al multaj personoj kies abono estas elĉerpita, kaj ankaŭ estas fakto ke la ĵurnalo ne povos longe vivi, se la abonantoj prokrastas pri la sendo de ilia reabono. Por ke ĉiu abonanto sciui ĉu li pagis aŭ ne pagis por la ricevita ekzemplero, ni, de nun, metos bluan krajonan krucon sur banderolo kiam la ĵurnalo estas sendata post finiĝo de abono. Ni esperas, ke ĉi tiu estos efika averto, kaj, ke kiam oni havas bluan krucon sur sia banderolo, tiam ni, per prok-sima kuriero, ricevos la malfruigintan abonon.

La XIV Kongreso-Helsinki.

Ni ricevis la sesan kaj sepan komunikaĵojn, kiujn ne estos utile re-presigi, pro tio, ke tiuj Aŭstralianoj kiuj intencas ĉeesti la kongreson jam foriris. Tamen ni rimarkas, ke 230 aliĝoj estas ricevitaj, ke la garantia

kapitalo nun estas 14,100 fmk. kaj ke la donacoj atingis la sumon da 6417 fmk. Ĝis nun preskaŭ nenio estis rice-vita por ekspozicio. La komitato petas la samideanojn diverslandajn sendi, ĉu donace, ĉu prunte, ekspozindaĵojn.

S-ro Percy T. B. Hudson kaj s-ro George Gordon, el Aŭstralio, parto-prenos la kongreson, kaj ambaŭ estas rajtigitaj delegitoj el la Aŭstralazia Esperanta Asocio.

Interesa Eltrovaĵ'o.

La direkcio de poŝtoj kaj telegrafoj en Praha la lan de nov invitis repre-zentantojn de ĵurnaloj, bankoj, komercaj rondoĵ kaj oficoj kaj pre-zentis al ili interesan eltrovaĵon en telefona fako, tiel nomatan "Tele-grafon." Ĝi estas kombino de gramofono kun telefono. Celo de tiu ĉi eltrovaĵo estas akceptadi kaj skribadi aŭtomate telefonajn sciigojn ankaŭ tiam, kiam ĉe la aparato neniu ĉeestas. Tiu ĉi eltrovaĵo estas gravega por ĵurnalistoj, komercistoj ktp. Praktike ĝi estos uzata post mallonga tempo en Praha kaj en grandaj urboj de la Ĉeĥoslovaka respubliko.—Josef Paša, en "Esperanto Triumfonta").

Esperanto ĉe Pariza Foiro.

Daŭraj antaŭsignoj klare montras, kela demando pri internacia lingvo pli kaj pli vekas intereson de Oficialaj Institucioj. La progreso estas mal-rapida sed certa. Jen nova pruvo el du faktoj. La Ligo de Nacioj, en la lasta septembra kunsido en Genevo alprenis deziresprimon, ke la de-mando pri enkonduko de instruado de Esperanto en la lernejoj estu studata kaj prilaborata per raporto de ĝia ĝenerala Sekretario. La dua fakto estas, ke la Komitato de la Pariza Foiro uzas Esperanton kiel helpan lingvon, sendas afiŝojn kaj cirkulerojn en Esperanto por dis-konigi eksterlanden tiun gravegan manifestacion de l' Franca Komerco: 3800 partoprenintaj firmoj, 2 milionoj da vizitintoj, 50,000 kvadrataj metroj da surfaco kovrita per butikoj aŭ haloj, tiaj resume estas la ciferoj atingitaj en 1921. Por ricevi senpage detalan programon por 1922, ĉiu povas rekte skribi al "Komitato de la Foiro de Paris, 8, place de la Bourse, Paris" ĉu per Esperanto, ĉu per nacia lingvo.

La Rivera S'tuparo.

De Rabindranath Tagore.

(Daŭrigo).

Malrapide elpaŝis la sanjazin el la templo. Kiam li volis malsupreniri sur la banŝtuparo, li ekvidis virinon solece tie sidantan kaj volis jam retiriĝi, kiam subite Kuzum levis la kapon kaj ekrigardis malantaŭen. Ŝia vualo deŝoviĝis malsupren kaj la luna lumo falis plene sur ŝian vizaĝon, kiam ŝi levis la rigardon al li.

Strigo kriante preterflugis super ambaŭ. Kuzum ekremis ĉe tiu voĉo, rekonsciigis kaj reŝovis la vualon super la kapon. Poste ŝi kliniĝis profunde antaŭ la sanjazin.

Li benis ŝin kaj demandis: — Kiu vi estas?

— Mia nomo estas Kuzum — re-diris ŝi.

Krom tio ĉi en tiu vespero nenio vorto estis parolita. Kuzum revenis malrapide al sia domo, troviĝanta tute en proksimo.

Sed la sanjazin en tiu nokto ankoraŭ dum longaj horoj restis sidanta sur miaj ŝtupoj. Fine, kiam la luna plenumis jam sian vojon de l' oriento okcidenten kaj la ombro de l' sanjazin transŝoviĝis de malantaŭe antaŭen, li leviĝis kaj foriris en la templon.

De tiu tempo mi vidis Kuzum ĉiutage veni al li kaj elmontri al li sian respekton. Kiam li estis fininta sian matenan diservon, li kutimis voki ŝin al si kaj paroli al ŝi pri religio. Ŝi eble ne povis ĉion kompreni, sed ŝi aŭskultis lin atente kaj silente kaj penis kompreni ĝin. Liajn montrojn ŝi obeis blinde. Ĉiutage ŝi venis en la templon, ĉiam preta servi al la dio, aŭ per tio, ke ŝi kolektis florojn por la matena aŭ vespera ofero, aŭ ĉerpis akvon el Ganges, por lavi la ŝtonan plankon de la templo.

La vintro proksimiĝis al sia fino. Malvarmaj ventoj blovis. Sed poste iun vesperon tute neatendite venis la varma printempa venteto de l' sudo; la ĉielo perdis sian frostan aspekton; post longa silento ree muziko kaj fluta ludo aŭdiĝis en la vilaĝo. La remistoj entiris la remilojn en la boatojn, lasis ilin flui kun la rivero kaj komencis kanti siajn malnovajn kantojn. La printempo estis veninta.

Tiam mi komencis denove ne vidi Kuzum. De kelka tempo ŝi estis

veninta nek al la rivero, nek al la templo aŭ al la sanjazin.

Kio dume okazis, mi ne scias, sed post kelka tempo en iu vespero mi renkontiĝis denove sur miaj ŝtupoj.

Kun mallevita rigardo demandis Kuzum: — Sinjoro, ĉu vi lasis mi voki?

— Jes, kial mi ne vidas vin plue? Kial en la lasta tempo vi komencis malzorgi la servon al la dioj?

Ŝi silentis.

— Diru al mi viajn pensojn tute malkaŝe.

Kun duondeturnita vizaĝo rediris ŝi: — Mi estas pekema virino, sinjoro, kaj tial mi ŝervas al la dioj nur malbone.

La sanjazin diris: — Kuzum, mi scias, vin io turmentas.

Ŝi ekremis facile. Poste ŝi kovris sian vizaĝon per sia sari (ŝtofo), kaj kiu oni en la oriento faras la turbanojn) kaj sidigis plorante sur la ŝtupoj ĉe la piedoj de l' sanjazin.

Li iom retiriĝis. Poste li diris: — Diru al mi, kion vi havas sur la koro, por ke mi povu montri al vi la vojon al la paco.

Ŝi respondis en tono de neekskusebla konfido, de tempo al tempo interrompante kaj pene eljetante la vortojn: — Se vi ordonas, do mi devas ĉion al vi diri. Sed estas tio malfacile, mi ne scias, kiel mi povas ĝin al vi klarigi. Vi, sinjoro, certe estas jam ĝin diveninta. Mi adoras iun kiel dion, mi preĝis al li, kaj mia koro estis tute plenigita per la feliĉeco de tiu ĉi sindono. Sed en tiu nokto mi havis sonĝon. Mi sonĝis, ke la estro de mia koro sidis apud mi en ĝardeno; li tenis mian dekstran manon en sia maldekstra kaj flustris al mi la vortojn de l' amo. Ĉio ŝajnis al mi konata kaj kvazaŭ devus esti tiel. La sonĝo pasis, sed ĝia efiko restis. Kiam mi lin revidis en la sekvinta tago, li aperis al mi en alia lumo ol antaŭe. Tiu sonĝo persekutis min. Mi forkuris en mia timo kaj tenis min for de li, sed la bildo ne cedis. De tiu tempo mia koro ne konis la pacon — ĉio en mi fariĝis malluma!

Dum ŝi kun larmoj en la okuloj rakontis sian historion, mi sentis, kiel la sanjazin la dekstran piedon forte premis sur mian ŝtonŝtupon.

Kiam ŝi estis fininta, li diris: — Vi devas al mi diri, kiun vi vidis en la sonĝo.

Kun kunmetitaj manoj petegis ŝi:
— Mi ne povas.

Li persistis: — Vi devas nepre diri, kiu li estis.

Ŝi spiris malfacile. — Ĉu mi nepre devas diri ĝin al vi? — Ŝi demandis.

— Jes — rediris li. — Vi estas li, sinjoro! — ŝi eljetis el si. Kaj kun konvulsia plorego ŝi falis kaj kaŝis sian vizaĝon ĉe mia ŝtona brusto.

Kiam ŝi denove venis al si kaj levigis, diris la sanjazin malrapide:

— Mi forlasas tiun ĉi lokon ankoraŭ hodiaŭ vespere, por ke vi ne revidu min. Konsideru, ke mi estas sanjazin, kiu ne apartenas al tiu ĉi mondo. Vi devas min forgesi.

Kuzum rediris per mallaŭta voĉo:
— Kiel vi ordonas, sinjoro.

— Fartu do bone — diris la sanjazin. Kuzum klinigis senvorte antaŭ li kaj ektuŝis respektoplene liajn piedojn. Poste li iris for.

La luno subiris; la nokto fariĝis malluma. Subite mi aŭdis ekplaŭdon de la korpo falinta en la akvon. La ventego blovis tra l' malluma nokto, kvazaŭ ĝi volus ĉiujn stelojn estingi sur la ĉielo.

El "La Esperantisto." Recenzo.

Himnaro Esperanta. Fleksebla tolo 1ŝ 8p. (8 respondkuponoj), rigida tolo, 2ŝ 2d, (10 respondkuponoj), afrankite. Brita Esperantista Asocio, 17 Hart St., Londono, W.C.1, Anglujo.

Nenie unueco estas pli dezirinda ol ĉe religiaj aferoj; la "unu ŝafaro" devas unuvoĉe adori kaj laŭdi Dion, kaj ĉi tie Esperanto povas sin ŝargi de dignoplena rolo. La bonaj rezultoj de pli granda interkompreno per nia lingvo internacia estas evidentaĵoj en aferoj nereligiaj, tiel ke estas nur logika ke oni ĝin uzu en la religia sfero ankaŭ, tial pligrandigante ĝian utilecon. Ĝis la mezepoko la latina lingvo bone taŭgis por tiu ĉi bezono, sed nuntempe, pro multaj kaŭzoj Esperanto estas la plej bona eklezia internacia lingvo.

Jam estas aperintaj multaj liturgioj esperantaj; en kelkaj lokoj okazas regule esperanta Diservo; tiu ĉi himnaro estas por ili bonveninta kaj inda kunulo. Por scii la principojn laŭ kiuj la himnaro estas kompilita, plej bone estas citi la antaŭparolon.

— 1. Estante tute neseakta, tamen definitive Kristana, ĝi estu uzebla de

ĉiu Kristano, kaj ĝi enhavu nenion kontraŭ la Biblio kaj la Apostola Kredkonfeso. 2. La lingva stilo estu simpla kaj facila. 3. Traduko laŭeble sekvu la originalon sence, rime kaj ritme. 4. Oni ne permesu gramatikan eraron pro "poezia libereco." 5. Oni evitu kiom eble la apostrofon.

Sekvas de tiuj ĉi principoj, (kiuj estas fidele observitaj en la himnaro), ke la tradukoj estas bonegaj, kaj ke oni povas facile rekonii la belajn kaj amatajn himnojn, kaj kanti ilin laŭ la tradicia muziko, uzante Esperanton ne kripligitan per la ellasado de finaj literoj. Multaj el la konvenaj arioj estas internaciaj; espereble tiuj ĉi himnoj, inter kiuj troviĝas la plej noblaj de la angla lingvo, same estos amataj sub formo esperanta de la Kristana Esperantistaro. La nuna eldono enhavas pli ol cent himnojn kiuj ne troviĝas lokon en la unua eldono, kaj ankaŭ la liturgiajn himnojn (kantikojn) aranĝitajn por kantado. La himnaro estas tute inda de konstanta uzado dum Diservo en ĉiuj landoj: restas por samideanoj tra la mondo ĝin uzi kaj uziĝi. (B.C.B.)

Tri Angloj Alilande, (Romano originale verkita en Esperanto de John Merchant, F.B.E.A.), 1ŝ 1d, (5 respondkuponoj), B.E.A., Londono.

Ĉi tiu romano estas amuza skizo montranta la malnovan sed ĉiam freŝan situacion de homoj vojaĝantaj en fremdajn landojn ne sciantaj lingvon krom la propran. Inter la "Tri Angloj" tamen troviĝis Esperantisto kiu superis ĉiujn lingvajn malfacilojn tiel ke ili povis rehejmiĝi akompanataj de siaj ĉarmaj fianĉinoj kiuj fariĝis fianĉinoj dum la vojaĝo. (B.C.B.)

La Karavano. W. Hauff. El germana lingvo tradukis J. W. Eggleton. Broŝurita 1ŝ 8p, (8 respondkuponoj). tolebindita 2ŝ 2d, (10 respondkuponoj), B.E.A., Londono.

Multaj samideanoj jam antaŭe estas ĝuintaj, ĉu en la germana lingvo, ĉu en ĉi tiu traduko, kiu aperis unue en 1910, verkojn de W. Hauff. Li havas profundan scion de la rakontarto, kaj la ses fabeloj de tiu ĉi libro bone ilustras la naturon de lia stilo, temo kaj arto. La Oriento, interesosplena kaj kolororiĉa, kune kun esperanta traduko rigide fundamenta, faras el tiu ĉi verketo tre konvenan kaj allogan kursan legolibron. Nun

estas havebla la dua eldono, en kiu la paĝoj estas pli grandaj kaj la preslitteroj pli grandaj kaj klaraj, ol en la unua. (B.C.B.)

Leakey's Introduction to Esperanto. The Dreadnought Publishers, 152 Fleet St., London. Prezo 3 pencej.

Ĉi tiu nova lernolibro aperis nur en pasinta marto. La enhavo estas dekunu lecionoj, kiuj klarigas la gramatikon en tre interesa maniero. Pri ĝia malalta prezo oni povas uzi ĉi tiun libreton kiel propagandilon. La antaŭparolo havas laŭdajn vortojn pri la U.E.A. (C.W.B.)

Knaboj Kaj Muziko.

Eble la edukistoj-legantoj de "La Suda Kruc" interesiĝos pri la suba letero de s-ro G. F. Hall, B.Sc., F.C.S., pri lia metodo de muzik-eduko por stimuli la muzikan percepteblecon de la knaboj de lia lernejo. — La muzika edukado de knabo komenciĝas je la lulkantoj de la patrino, daŭras tra lia lerneja tempo per kursokantado, kaj kutime finas kiam lia voĉo ekrompiĝas. Senigi knabon de muzik-lecionoj sole pro tio, ke li ne povos esti ludanto evidente estas eraro. Dum la viriĝa tempo la estetikaj interesoj normale ricevas fortan antaŭenpuŝon, ofte subitan vekigon, kaj, kvankam la knabo ne povas kanti, li pli bone povas esti la belekon de bona aŭ altranga muziko. Celante helpi la knabojn al tiu ĉi estimeco de klasika muziko, la Stroud Central School jam alprenis serion de muzik - estimeco - lecionoj. Granda gramafono estas uzata por ripeti klasikajn muzikaĵojn luditajn de bone konataj artistoj, orkestroj, k.t.p. kaj la knaboj rapide eltrovis interesajn trajtojn, ekzemple, la Rusa danco en la 1812a uverturo de Tchaikovsky. Rimarkindaj estas la rezultatoj jam ricevitaj, ekzemple, dum la lasta leciono, post mallonga parolado pri Chopin, nenomita muzikaĵo de li ludiĝas gramafone, kaj la knaboj devis respondi al la jenaj demandoj:—

1. Ĉu vi pensas ke tiu ĉi signo feliĉan aŭ melankolian aferon?

2. Kian titolan vi donus al muzikaĵo?

Estis la Funebra Marĉo ludita de "Band of the Coldstream Guards" kaj Chopin li mem kontentigis pri interpreto de sia senkompara verko.

Oni diras, ke la "Funebra Marĉo" estas simila al la ruiniga veo kaj la ĝojo de la morto, sekvata de la tensiĝo de mistika espero dum animo leviĝas triumfe en la ĉielo kaj interese estas vidi la estimojn tiu ĉi en la respondoj al la demando. Unuvoĉe la knaboj konsentas ambaŭ melankolio kaj feliĉo trovi kaj la subajtitoloj estas proponitaj.

1. La forpaso de la ventego.
2. La veno de la printempo.
3. Mara entombigo.

En la unua kaj dua estas la lecionoj de la ventego kaj vintro de la maro, anstataŭitaj de la mistika espero kaj la trankvileco kaj printempo de l' eterna vivo.

La tria titolo enhavas la ideon de morto kaj entombigo, kaj estas tre interesa, kiam ni memoras, ke ĉi tiu sia tuta kompozicio, Chopin elmontras ondovon de la melodio, kiun oni priskribis "kiel boateto sur la brando de la suprenjetantaj ondoj."

S-ro Hall, la lernejestro de la Centra Lernejo, Stroud, Gloucestershire, England, estas fervora esperantisto. Ĉe la ĉiujara ekspozicio de la lernejo, estis interesa elmontraro rilate al la esperanta kurso. Per kartoj kun koraj salutoj de junaj esperantistoj en aliaj landoj kun la tura landkarto elmontranta Anglion kunligitan kun tiuj landoj laŭ ŝatatan elmontraron.

La atento de vizitantoj alturniĝis al la nova poŝtmarko de la ĵus ŝtato el Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio, la ĝia figuro de virino, la brakoj levitaj simbole de la rompitaĵoj kate, Aŭstria, kaj la spirito de nacia libereco.

HAROLDO PUDNEY

Kuracisto de Fonto-Plumoj

Ĉu vi havas kriplan fontoplumon, kiu malhelpas vian skribadon? Portu ĝin al li, kaj li tute rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontoplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facilaj por via monujo. Mendoj per poŝto estas lia specialo. Memoru la adreson:

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

Armena Poezio.

Foriru, nub', de mia koro,
 Cielo blua malfermiĝu
 Kaj tra mallumo de nebulo
 Printempa, brila sun' montriĝu ...

Kaj disiriĝu enuiga
 Funebra vest' de vintr' malvarma,
 De la naturo juna brilu
 Rideto gaja kaj ĝojlarma ...

La larmoj do de la ĝojado
 De montoj tiuj ĉi ekfluu,
 Al freŝa herbo bonsciigojn
 La riveretoj antaŭdiru: ...

Car de katenoj premegintaj
 La ter' — patrino liberigis,
 Car de l' alaŭdo malfeliĉa
 La senkuraĝa kant' aŭdigis ...
 Hovhanesjan H.

La Internacia Urbo.

La Unuiĝo de la Internaciaj Asocioj daŭrigas sian agadon por la starigo de Internacia Urbo, kombinota kun la Universala Ekspozicio de Bruselo en 1930. Ĝi prezentis sian projekton al la diversaj ambasadoroj kaj regnaj senditoj. Kelkaj el ili akceptis kun interesi la komunikon (Granda Britujo, Japanujo, Hispanujo, Rumano, Svislando, Ĉeĥoslovakio, Argentino, Ĉilio, Persujo, Meksikio).

En la Monda Palaco, la sidejo de la Unuiĝo, okazis speciala kunveno la 1an de januaro, prezidita de D-ro Adacti, Ambasadoro de Japanujo.

Diskutinte la projekton, kiun prezentis kaj klarigis S-roj Paul Otlet kaj Senatano H. Lafontaine, la ĉeestantaj aŭ reprezentataj ambasadoroj kaj ministroj decidis havigi la proponon al siaj regnestroj.

La Komitato elektita de la Unuiĝo estos baldaŭ pligrandigata per aldono de naciaj sekcioj. La Regnestroj estos invitataj por starigi tiujn sekciojn sub ilia oficiala protektado, kaj kun la celo plej atente pristudi la tutan demandon.

La komisionanoj alportos siajn konkludojn en konferencon, kiu okazos en Bruselo dum la monato junio 1922.

"Belga Esperantisto."

Kunigo de Ordinara kaj Senfadena Telefono.

Ĉe la sveda ŝtata telegrafejo oni faris dum la lasta tempo eksperimentojn kun nova eltrovaĵo tre grava. Ni scias, ke ekzistas kaj telefono kun fadeno, kaj telefono sen fadeno. Nun oni konstruis aparaton por kunigi la ordinaran telefonon kun la senfadena.

Tio havos grandan signifon. Vojaĝantoj povos per la telefono de ŝipoj paroli kun personoj en la hejmo, la komercisto kun siaj dungitoj, la ŝipestro kun la pilotoj aŭ kun aliaj ŝipestroj kfp.

La nova eltrovaĵo ne estas tute preta por uzo, sed post mallonga tempo la unuaj aparatoj estos fabrikataj.

Kiam fremda ŝipo venos al haveno, oni povos telefoni tien; sed tiam povus okazi, ke ili ne komprenus unu la alian pro neperfekta elparolo de la lingvo uzota, ekz. se oni uzos la anglan, francan aŭ alian lingvon. Nia Esperanto ankaŭ tie ricevos gravan signifon, ĉar per ĝi oni povus pli facile komprenigi sin. — (Henning Halldor, en "Esperanto Triumfonta").

Gazetoj Ricevitaj.

Amerika Esperantisto, apr.; Brizila Esperantisto, jan.-feb.; Bulgara Esperantisto, feb., mar.; Brazila Vivo, Rua General Sampaio, 330, Fortaleza, Ceara; 25 respondkuponoj jare, feb.; Export Esperantist, E. M. Pope, room 401, 102 N. Wells St., Chicago, Usono, mar., apr.; Espero Teozofia, mar.-apr.; Esperanto Triumfonta, 16 apr.; Espero Katolika, mar., apr.; Eklezia Revuo, mar.; Esperanta Finnlando, jan., feb., mar.; France Esperanto, apr.; Kristana Espero, jan.-feb.; Konkordo, (antaŭe La Provo), Jezuitska, Zagreb, Jugoslavio, monata (15 respondkuponoj), n-ro 1, apr.; La Verda Ombro, mar., apr.; La XIII, n-roj 4, 5, La fina eldono de ĉi tiu raporto de la Praha Kongreso. La Progreso, apr.; Literatura, jan.-mar.; Litova Stelo, feb.; Nova Eŭropo, mar.; Revuo Orienta, mar.; Sennacieca Revuo, apr.; Verda Utopio, mar., apr.; Victoria Education Gazette and Teachers' Aid, Melbourne, maja; enhavas interesajn artikolojn pri Esperanto.

Ekzameno por B.E.A. Diplomo.

Gratulojn al s-ro John E. Dixon, Blaketown, Greymouth, N.Z.; s-ro W. L. Waterman, Torrens-ville, S.A., kaj David Tilly, Whangarei, N.Z., (Prezidanto de la tiea grupo kaj Delegito por la U.E.A.), kiuj lastatempe gajnis la diplomon de la B.E.A. S-ro Dixon distinge sukcesis.

Al Niaj Subtenantoj.

Ni ricevis la jenajn sumojn, kun danko:—A. Aubry, 10/-; M. Fraser, £1; H. H. Perrott, 5/-; H. Partridge, 4/6; W. Cameron, 4/6; T. Aoki, 2/1; E. Yanečka, 1/-; G. D. Kvarestrom, 5/-; A. Gregory, 4/6; B. A. Claričić, 4/6; A. Carter, 5/-; D. Hitchcock, 10/-; P. Redenz, £1; R. N. Crichton, 4/6; C. W. Knetsch, 10/-; L. Starr, 4/6; — Batchelor, 4/6; G. Mercer, 4/6.

BOOKS.**REDUCTION IN PRICE.**

Lilio, by E. A. Sinnotte, 2/6, post free
 Passing of Babel, 7d., post free.
 Lingvaj Respondoj, 1/3, post free.

Owing to the necessity of providing room for fresh stock, we have been compelled to make the above reduction for ONE MONTH.

The following literature is on hand:
 Sonoĝo de Someromeza Nokto, 2/9, post free.

Vivo de Zamenhof, 3/9, post free.

Revizoro, 3/6, post free.

La Lastaj tagoj de Zamenhof, 1/2, post free.

Vortoj de Zamenhof, 2/3, post free.

La Faraono, 3 vols., 11/- set, post free.

La Fina Batalilo, 2/6, post free.

Batalo de l' vivo, 1/9, post free.

Write for price list, or send your order to the Librarian.

AUSTRALASIAN ESPERANTO ASSOCIATION,

Box 731, P.O., ELIZABETH ST., MELBOURNE.

Is your subscription to the Suda Kruczo paid to date? Watch for the cross on the wrapper.

S-ro Ernesto Yanečka, Vitkovice, Ostrava, Republikanska 28, Moravia, Ĉeĥoslovakio, deziras korespondadon samideanoj en Aŭstralio kaj Nov-Zelando.

S-ro Tchiro Aoki, 77/7 Chonin, Kami-Tsutsui, Kobe, Japan, volas interŝanĝi P.M. kaj IPK. Ĉiam spondos.

S-ro Adolfo Oberrotman, Dąbrowa, U.E.A., volas korespondadi seriozaj personoj pri komercaj aferoj. PM., ktp. Adr. Pollanda Komercia Agentejo, str. Krak. Presden 10, Warsaw, Poland.

S-ro Pedro Juarez Cano, Apóstolo 148, Santa Clara, Cuba, prezidanto de Studenta Esp. Soc. deziras gekorespondantojn.

ESPERANTO BOOKS.**THE LATEST.**

English-Esperanto Dictionary, Fulcher & Long, 8/8, post free.
 Cox's Commentary and Grammar, 4/7, post free.

Send for price list of Esperanto books. New publications arrive every mail. Special terms for groups.

Wholesale distributors of Hyde's Esperanto Guide.

All classes of progressive literature are obtainable from

PYKE'S BOOK SHOP,

212 SWANSTON STREET, MELBOURNE.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

Two Million Books and Pieces of Music.

Send for "The Rainbow," Cole's Monthly about Books.

Free to You.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, Hardware Club Chambers, Little Collins Street, Melbourne, by Fraser & Morphet, Printers, Eastbourne Street, Windsor.